

James Hawkey
University of Bristol, Britio

Pri la studado de fonetika kaj fonologia variado en ‘disa’ Esperantujo

Resumo: Parolantoj de Esperanto troviĝas disaj tra la mondo kaj ofte ne havas multe da kontakto inter si. Aldone, la lingvo estas ĉefe parolata nederaske de homoj, kiuj havas tre diversajn denaskajn lingvojn. Tiuj du faktoroj gravas se oni volas pli profunde kompreni, kiel ni parolas Esperanton en la dudek-unua jarcento. Adopti variadisman aliron al la sociolingvistiko de Esperanto povas helpi pli bone kompreni la lingvon kaj ĝiajn parolantojn. En ĉi tiu artikolo, mi proponas la koncepton de ‘disa komunumo’ por priskribi la manierojn, laŭ kiuj la esperantistaro diferencas de aliaj parolkomunumoj rilate al geografio, demografio, ideologio kaj praktiko. Sekve, mi reliefigas kelkajn praktikajn defiojn, kiuj aperas pro tiu diseco, kaj proponas eblajn solvojn. Fine, por instigi plian esploradon pri fonetika kaj fonologia variado en Esperanto, mi prezentas superrigardon pri la segmenta fonologio de la lingvo. Tiu priskribo celas esti utila ilaro por estontaj fakuloj pri lingva variado en Esperanto, ĉar ĝi substrekos kie kaj kiam oni atendas trovi enparolantan variadon. La ĉefa celo de la artikolo estas provizi teoriajn kaj praktikajn rimedojn por pliaj studoj pri la sonsistemo de Esperanto en ĝia socia kunteksto.

Ŝlosilvortoj: Variadisma sociolingvistiko; Fonetiko kaj fonologio; Disa komunumo

1 Enkonduko

Estas nekontesteble, ke lingvoj ŝanĝiĝas laŭ la tempo kaj spaco (Labov 1994, 9), kaj el tio ni povas konkludi, ke ĉiuj lingvoj spertas internan variadon. Por ke lingvo transiru de la uzo de pli malnova formo A al nova formo B, devas ekzisti momento, kiam la formoj A kaj B iel kunekzistis en la parolkomunumo. Tial, “variado estas la sinkrona vizaĝo de ŝanĝiĝo, kaj ŝanĝo estas nenio alia ol diakrona variado” (Guy 2011, 179).¹ Esperanto estas lingvo kun sia propra komunumo de parolantoj, kaj kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, ĝi spertas lingvan ŝanĝon (Fiedler kaj Brosch 2022, 326). Sekve, ni devus povi observi kaj interparolantan kaj enparolantan sinkronan

1 Originala teksto: “Variation is the synchronic face of change, and change is nothing more than diachronic variation.” – Ĉiuj tradukoj estas miaj.

variadon en Esperanto. En ĉi tiu artikolo, mi traktos kelkajn el la ĉefaj aferoj, kiujn oni devas konsideri dum esplorado pri lingva variado inter parolantoj de Esperanto. La ĉefa celo de la artikolo estas instigi estontajn esploristojn adopti la variadisman sociolingvistikon (*variationist sociolinguistics*, angle) kiel aliron al la studo de Esperanto, kampo kiu ĝis nun apenaŭ ricevis atenton en fakaj verkoj pri la lingvo.

La artikolo konsistas el du partoj. En la sekcio 2, mi prezentos teoriajn kaj praktikajn konsiderojn, kiuj gravas por adopti variadisman aliron al la studo de Esperanto. Unue, mi skizos la kernajn principojn pri lingva variado en parolkomunumoj, kiuj konsistas ĉefe el nedenaskaj parolantoj. Poste, mi pritraktos la disecon de esperantistoj, laŭ geografio, demografio, ideologio kaj praktiko, kaj diskutos la teoriajn kaj praktikajn defiojn, kiujn tiu diseco prezentas al estontaj esploristoj pri lingva variado en Esperanto. Klariginte tiun fonon, en la sekcio 3, mi proponos praktikan ilaron por esplorado pri sona (t.e. fonetika kaj/aŭ fonologia) variado en Esperanto. Mi decidis mallarĝigi la temon kaj elekti nur la sonan flankon kiel eron de la pli vasta bildo de lingva variado. Tiu ilaro estas profilo de la segmenta fonologio de Esperanto, simila al la '*Illustrations of the IPA*' regule publikigitaj en la *Journal of the International Phonetic Association*. Ĝi celas helpi esplorontojn kompreni, kiel oni nuntempe prononcas Esperanton kaj identigi lokojn, kie oni povas atendi variadon, tiel indikante eblajn fruktodonajn vojojn por estonta esplorado.

2 Lingva variado en 'disa' komunumo

Ĉi tiu artikolo celas instigi profundan esploron pri lingva variado ene de Esperanto, kies parolantojn mi priskribos kiel anojn de 'disa komunumo'. En ĉi tiu sekcio, mi prezentos la teoriajn fundamentojn necesajn por ke fakuloj povu studi fonetikan kaj fonologian variadon en Esperanto. Unue, en la sekcio 2.1, mi donos vastan enkondukan superrigardon pri la studo de lingva variado. Poste, en la sekcio 2.2, mi prezentos mian koncepton de 'disa komunumo' rilate al parolantoj de Esperanto, klarigante kiel tiu parolkomunumo diferencas de tiuj ĝis nun kutime analizataj en la kampo de variadisma sociolingvistiko. Fine, en la sekcio 2.3, mi priskribos kelkajn defiojn, kiujn esploristoj povas renkonti dum la studado de sona variado en Esperanto, kaj mi proponos eblajn solvojn por tiuj problemoj.

2.1 Enkonduko al lingva variado

En la mezo de la dudeka jarcento aperis studoj, kiuj celis esplori la socian signifon de lingva variado, ĉefe en nordamerikaj kuntekstoj. Tiuj studoj

respondis al la generativisma aliro de Chomsky (1957), kiu ekregis en la 1950-aj jaroj. La fundamenta verko de Weinreich, Labov kaj Herzog (1968) starigis empirie bazitan teorion pri lingva ŝanĝo, kiu akceptis la diversecon de parolpraktikoj kaj ekzamenis, ĉu tiu diverseco estas strukturita kaj orda. En tiuj fruaj studoj, Labov proponis la koncepton de *ena stilo* (*vernacular*, angle) kiel kernan en la analizo de variado. Li difinis ĝin kiel “la lingvo unue akirita de la lernanto, perfekte regata kaj uzata ĉefe inter intimaj amikoj kaj familianoj” (Labov 1966/2006, 86), kaj “la stilo, kiu plej interesas lingvistojn” (Labov 1966/2006, 86; 1972, 208).² La intereso pri la ena stilo, kaj la konscio ke ĝi estas nur unu parto de la pli vasta repertuaro de la parolanto, instigis la evoluon de metodoj por estigi diversajn parolstilojn. La tiel nomata ‘Labova sociolingvistika intervjuo’ konsistas el serio de taskoj, kiuj produktas parolon laŭ malsamaj gradoj de atento. Ekde tiuj pioniraj studoj, la kampo de variadisma sociolingvistiko spertis plurajn ondojn de evoluo, profitante de pli ol duonjarcento da progresoj en sociaj kaj kritikaj teorioj. Dum la fako maturiĝis, esploroj pri la naturo kaj uzo de la ena stilo kondukis al kreskanta uzo de etnografiaj metodoj por kolekti datumojn, kio siavice ebligas pli nuancajn interpretojn de lingva variado.

La emfazo pri la ena stilo kiel ilo por kompreni la diversecon de lingva variado signifis, ke multaj variadismaj esploroj koncentriĝis pri la praktikoj de denaskaj parolantoj.³ Tamen, dum la disciplino evoluis en la lastaj jardekoj, ĉi tiu fokuso pri denaska kompetento malfortiĝis, kaj studoj pri nedenaska produktado nun alportas gravajn komprenojn al la kampo. Esploroj pri lingva minoritatigo kaj malaperado kondukis al nova vidpunkto pri nedenaskaj uzantoj de ‘malgrandaj’ lingvoj (Pietikäinen k.a. 2016), prezentante ilin kiel *novajn parolantojn* (*new speakers*, angle), difinitajn kiel “individuoj kun malmulta aŭ neniuj hejma aŭ komunuma ekspono al minoritata lingvo, kiuj anstataŭe akiras ĝin per lingva mergiĝo, dulingvaj edukprogramoj, revigligaj projektoj aŭ kiel plenkreskaj lernantoj” (O’Rourke k.a. 2015, 1).^{4,5} La studo

2 Originala teksto: “The language first acquired by the language learner, controlled perfectly, and used primarily among intimate friends and family members [and] the style of primary interest to linguists.”

3 Mi uzas la terminon ‘denaska parolanto’ anstataŭ ‘denaskulo’, ĉar tiu lasta vorto pensigas la leganton ĉefe pri denaskaj parolantoj de Esperanto.

4 Originala teksto: “Individuals with little or no home or community exposure to a minority language but who instead acquire it through immersion or bilingual education programs, revitalisation projects or as adult learners.”

5 Estas ofta (tamen neklara) distingo inter novaj parolantoj kaj lernantoj de dua lingvo. Oni plej ofte uzas la terminon nova parolanto en studoj pri minoritataj lingvoj, kiuj havas relative malmultajn ‘tradiciajn’ parolantojn. Tiuj novaj parolantoj kutime havas ian (kulturan, geografian, ktp.) rilaton al la parolkomunumo, t.e. ili apartenas iagrade al la sama komunumo kiel tradiciaj parolantoj. Ne estas same por lernantoj de dua lingvo, kiuj ofte estas fremdaj al la koncerna lingva komunumo (kaj relative malofte temas pri minoritataj

de nedenaskaj parolantoj, novaj parolantoj kaj kuntekstoj de malaperado devigas nin rekonsideri la naturon de la parolkomunumo, ĉar grupoj de parolantoj en situacioj de lingva endanĝerigo ne estas same koheraj kiel ‘kutimaj’ komunumoj de denaskaj parolantoj. Nance (2022, 678) demandas: “kiam estas konvene kompari generaciojn en studo pri sonŝanĝo, kaj kiam ne, ĉar la parolantoj ne konsistigas la saman parolkomunumon?”⁶ Novaj parolantoj en situacioj de lingva malaperado tre diferencas de lernantoj de dua lingvo, kiu ne estas endanĝerigita. Ili ne estas simple neperfektaj lernantoj, kies praktikoj estas vidataj kiel subaj kompare kun tiuj de denaskaj parolantoj; male, novaj parolantoj ofte estas la sola vojo al postvivado por malaperantaj lingvoj (Nance 2015, 574; Mooney 2024, 202) kaj tial “okupas pli altajn poziciojn en la socia hierarkio de la lingvo ol kutimaj uzantoj de dua lingvo” (Nance k.a. 2016, 168).⁷

En ĉi tiu artikolo, mi traktos nur sonan variadon, kiu origine estis la ĉefa fokuso de la fruaj variadismaj studoj. Tio estas ĉar la ideo de fonetika varianto plej bone kongruas kun la difino de Labov (1972, 188) pri lingvaj variantoj kiel “diversaj manieroj esprimi la saman aferon”.⁸ Ekde tiam, la fako evoluis, kaj nun inkluzivas la studon de gramatikaj kaj leksikaj variabloj, kiuj same estas validaj esplorobjektoj en Esperanto. Tamen, ĉi tiu verko limigas sian amplekson al sona variado, konsiderante ĝin kiel logikan ekpunkton por antaŭenigi pli vastan variadisman esplorprogramon pri Esperanto, kiun mi adoptos kaj evoluigos en estontaj verkoj.

2.2 Esperantujo kiel ‘disa komunumo’: geografio, demografio, ideologio kaj praktiko

Estas gravaj malsamecoj inter komunumoj de denaskaj parolantoj unuflanke, kaj grupoj de ne-deneskaj (aŭ novaj) parolantoj aliflanke. Komunumoj de nedenaskaj aŭ novaj parolantoj ne ĉiam estas demografie ekvilibras: malkiel socioj de denaskaj parolantoj, iliaj membroj ne sekvas apartajn ŝablonojn rilate al aĝo, sekso, socia klaso kaj aliaj faktoroj. Grupoj de

lingvoj). Mi klarigas per persona ekzemplo. Mi estas kimro, naskiĝis kaj kreskis en Kimrio, sed en tute anglalingva medio. Dum la lastaj jaroj, mi lernis la kimran kiel plenkreskulo, do (pro mia kimreco!) mi estas nova parolanto, laŭ la kutima uzo de la termino. Aliflanke, mi lernis la francan, kaj flue kapablas ĝin post jaroj loĝante en Francio. Tamen, mi nek estas franco nek havas francajn parencojn, do mi estas nura lernanto de la franca. Mi substrekas, ke tio estas mia interpreto, kaj aliaj fakuloj certe komprenas tiun distingon alie.

6 Originala teksto: “At what point is it appropriate to compare generations in a sound change study, and at what point is it no longer appropriate, as speakers do not constitute the same speech community?”

7 Originala teksto: “[New speakers] occupy greater positions of authority in the language’s social hierarchy than many second language users would do.”

8 Originala teksto: “Alternate ways of saying the same thing.”

novaj parolantoj ofte povas esti disaj tra granda geografia areo kaj ne havas ĉiutagan kontakton unu kun la alia, kaj tio certe validas por esperantistoj. Pro tiu diseco, mi nomas tiajn parolgrupojn ‘disaj komunumoj’ (*fragmented communities*, angle) (Hawkey aperos). Mi iom adaptas la terminon ‘disa’ (aŭ *fragmented*) el Kasstan (2019, 687), kiu priskribis la arpitanan lingvon⁹ tiel pro manko de tipologia kohero inter dialektoj, sed ĉi tie ĝi aplikiĝas al parolantoj kun malfortaj ligoj tra disaj lokoj. En la cetero de ĉi tiu sekcio, mi montros kiel la parolantaro de Esperanto estas disa komunumo, kaj kiel ĝi estas malsama ol ‘kutimaj’ parolkomunumoj (t.e. grupoj de denaskaj parolantoj de hegemoniaj lingvoj), pere de kvar dimensioj: *geografio*, *demografio*, *ideologio* kaj *praktiko*.

Geografie, Esperanto ne havas specifan patrujon, do oni ne povas bazi Esperanto-identecon sur teritorieco. Ĝiaj parolantoj estas disaj en la mondo, kaj kutime temas pri malgrandaj grupoj de individuoj, familioj aŭ amikoj, kiuj troviĝas en regionoj kie regas unu aŭ pluraj hegemoniaj lingvoj (Stria 2016, 153). Hampton (2023, 44) priskribas la esperantan komunumon kiel “prototipe transnacia” (*prototypically transnational*), uzante la koncepton de transnaciismo de Vertovec (2004), kiu rilatas al la daŭra ligo inter migrantoj kaj iliaj originaj kutimoj kaj kulturoj danke al teknologiaj progresoj kaj tutmondiĝo. Tiel, esperantistoj estas geografie malproksimaj unu de la alia, sed restas en konstanta kontakto. Aliaj esploristoj priskribas la esperantan komunumon pere de ideoj pri migrado kaj movebleco, kvankam multaj parolantoj de la lingvo neniam migris. La nocio de la komunumo kiel iel ‘diaspora’ estas vaste uzata. Jam en 1979, Wood priskribis esperantistojn kiel “mem-elektita(n) diaspora(n) lingva(n) minoritato(n)”,¹⁰ kiu influis la raŭmistan vidpunkton en la 1980-aj jaroj. Poste, pluraj aŭtoroj – ekzemple Piron (1989), Becker (2006), Lindstedt (2010), Stria (2016), kaj Fiedler kaj Brosch (2022) – uzis la terminon ‘diaspora’ por priskribi la komunumon, pro ĝia geografia disiĝo kaj la manko de stabilaj situacioj aŭ kuntekstoj (ekster la hejmo kaj limigitaj amikaj rondoj) por uzi la lingvon. Tamen, malgraŭ ĉi tiuj ideoj pri migrado kaj geografio, la koncepto de teritoria aparteno estas ĝenerale rifuzata kiel bazo por esperanta identeco (Wood 1979; Gobbo 2017, 44; Stria 2018). Tio ne signifas, ke la komunumo tute preterlasas la ideon de spaca identeco: eĉ la termino ‘Esperantujo’ montras ian abstraktan senton de ‘hejmo’. Resume, Esperanto estas klare neteritoria lingvo, sed ĝia komunumo tamen foje inspiriĝas je kelkaj elementoj de teritoria aparteno.

9 “La arpitana estas unu el la tri gaŭlromanaj lingvoj (la aliaj estas la okcitana/kataluna kaj la franca).” (“Arpitana lingvo” 2024)..

10 Originala titolo de la artikolo: “A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community.”

Demografie, grupoj de novaj parolantoj ofte estas malsamaj ol anoj de parolkomunumoj de hegemoniaj (aŭ eĉ minorigitaj) lingvoj pro la fakto, ke la plejmulto de novaj parolantoj estas ekonomie komfortaj (Pujolar 2022, 79). Lernantoj de minorigitaj lingvoj estas homoj, kiuj atribuas simbole gravan signifon al kompetento en malpli uzataj lingvoj kaj, grave, havas tempon kaj financajn rimedojn por lerni tiajn lingvojn. Pujolar (2022) asertas, ke la demografiaj trajtoj de komunumoj de novaj parolantoj varias laŭ la specifa situacio de la koncerna lingvo, kaj Esperanto (se ni adoptas raŭmisman perspektivon pri ĝi kiel minoritata lingvo) ne estas escepto. Por pli bone kompreni la demografion de la esperanta komunumo, Piron (1989) analizis listojn de reprezentantoj de UEA kaj personojn, kiuj sendis anoncojn al esperantaj revuoj por serĉi lingvajn interŝanĝojn. Li trovis pli grandan proporcion de viroj, emeritoj, kaj homoj en intelektaj profesioj (ekzemple instruistoj) inter la UEA-representantoj ol en la ĝenerala popolo. Rimarkindaj diferencoj aperis laŭ geografia deveno: ekster Eŭropo kaj Nordameriko estis malpli da parolantoj kaj preskaŭ neniuj virinoj. Tamen, Piron (1989, 166) konstatis, ke virinoj estis 48 % de la personoj, kiuj sendis anoncojn, kio sugestas, ke eble la seksa malekvilibro ne estis tiel ekstrema. Similaj rezultoj troviĝas en Kimura (2012), Caligaris (2016) kaj Hampton (2023) pri nuntempaj Esperanto-rondoj, ekzemple pri la forta ĉeesto de aĝaj partoprenantoj. Gobbo (2021, 6) tamen avertas, ke pli aĝaj esperantistoj neniam estis (kaj ne estas) izolitaj kaj havas oftan kontakton kun junaj parolantoj de la lingvo, do oni ne facile komparu ilin kun aĝaj uzantoj de aliaj malaperantaj lingvoj. Profesie, longe ekzistis ligo inter esperantistoj kaj maldekstra sindikatismo kaj intelektismo (Garvía 2015; O’Keeffe 2021; Karlander 2024), kio eble klarigas la koncentriĝon en specifaj okupoj. Aldone, se oni volas scii pli pri la demografio de Esperantujo, necesas atenti pri kvireco en la komunumo kaj eviti simplisman binaran komprenon de sekso, malgraŭ la trovoj de pli fruaj studoj. Hampton (2023, 115–116) raportas, ke kvar el ŝiaj partoprenantoj identigis sin kiel neduuma aŭ transgenra. Resume, la demografio de Esperantaj komunumoj povas esti rimarkinde malsama, eĉ ol tiu de aliaj grupoj de novaj parolantoj.

Ideologio verŝajne estas la plej unuiga trajto, kiu difinas membrecon de la esperanta komunumo. Ĝi inkluzivas ne nur ideologiojn pri la lingvo mem, sed ankaŭ pli larĝajn mondrigardojn. Anoj de la esperanta komunumo plejparte konsentas pri lingvaj formoj kaj normoj (Stria 2018). Tamen, eble pli grava estas la komuna ideologia bazo rilate al lingva justeco. Inter membroj de la komunumo, oni ofte distingas inter ‘esperantistoj’, kiuj estas forte implikitaj en la movado (ekzemple, tiuj kiuj aktive partoprenas kulturajn eventojn kaj subtenas la idealojn de egaleco kaj homaranismo), kaj ‘lingvouzantoj’, kiuj simple uzas la lingvon sen adopti la kulturajn kaj

ideologiajn elementojn (Lindstedt 2010). Miaopinie, eĉ parolantoj, kiuj ne plene akordiĝas kun la idealoj de la movado, restas membroj de la disa parolkomunumo kaj devus esti inkluditaj en studoj pri Esperanto. Uzi 'la sekvon de movadaj idealoj' kiel kriterion por difini membrecon estus nepraktebla, ĉar ĝi ne estas facile mezurebla kaj povas ŝanĝiĝi laŭlonge de la tempo (kaj ĉar oni ja povas subteni la idealojn sen regi la lingvon!). Tamen, kompreni la rilaton de parolantoj al la ideologioj de la movado estas kerna por interpreti datumojn, kiujn ili produktas.

Fine, Stria (2018, 226) kaj Hampton (2023, 39) substrekas la gravecon de *praktiko*, kaj priskribas parolantojn de Esperanto kiel *komunumon de praktiko* (*community of practice*, angle), difinitan de Eckert kaj McConnell-Ginet (1992, 464) kiel "aro da homoj, kiuj kunvenas ĉirkaŭ reciproka engaĝiĝo en komuna entrepreno... [kaj kiel rezulto] praktikoj aperas dum la kurso de ĉi tiu reciproka entrepreno."¹¹ Esperantistoj estas identigitaj laŭ tio, kion ili faras: ili kunvenas por partopreni en komune konstruita projekto, nome la daŭra uzo de Esperanto. Lindstedt (2010, 60) asertas, ke por sukcese uzi la lingvon, parolantoj devas regule partopreni en kolektivaj eventoj, por eviti perdon de lingvokapablo pro forgesiĝo. Tiel, Esperanto kontrastas kun la angla kiel tutmonda lingvo, ĉar parolantoj de la angla kiel dua lingvo povas uzi ĝin (kaj tiel konservi kompetentecon kaj fluecon) sen engaĝiĝi al la anglalingva kulturo (Lindstedt 2010, 60). Ĉi tio plifortigas la supre faritan argumenton, ke aliĝo al la ideologio de la movado ne estas fidinda kriterio por difini membrecon en la komunumo. Se ĉiu interago inter esperantistoj estas iel manifestiĝo de Esperanto-kulturo, tiam ne gravas ĉu parolantoj estas fervoraj esperantistoj aŭ pli skeptikaj lingvouzantoj, ĉar ĉiuj kontribuas al la konservado de la lingvo per la komuna praktiko uzi ĝin. Hampton (2013, 39) emfazas la ironion de la praktiko, kiu difinas esperantistojn: aro da plurlingvaj individuoj kunvenas por paroli unu lingvon, ekskludante ĉiujn aliajn lingvojn. La fakto, ke esperantistoj povas esti difinitaj laŭ siaj lingvaj praktikoj, instigas Gledhill (2000; 2014) pridubi, ĉu la termino "parolkomunumo" eĉ taŭgas por priskribi Esperantujon. Gledhill (2000) preferas la esprimon "diskurs-komunumon" (laŭ Swales 1990), kiu forigas la tradician antaŭkondiĉon de flueco por membreco de lingva komunumo. Anstataŭe, aliaj faktoroj gravas por determini, ĉu iu povas esti konsiderata kiel membro de la komunumo, ekz. kono de ofte traktataj temoj. Mi detale pritraktos la ideon, ke esperantistoj estas anoj de "diskurs-komunumo" en Hawkey (aperos).

11 Originala teksto: "An aggregate of people who come together around mutual engagement in an endeavor... [As a result], practices emerge in the course of this mutual endeavor."

2.3 Studi lingvan variadon en disa komunumo: defioj kaj solvoj

Kion ni nun scias pri la esperantistaro kiel kolektivo, kaj kial tio gravas por esploro pri variado en tiu lingvo? Kiel ĉe aliaj disaj komunumoj, ĉi tiu grupo de lingvouzantoj distingiĝas pro sia geografia disvastigo kaj demografia konsisto, same kiel pro la ideologioj kaj praktikoj de siaj membroj. Ni traktas komunumon disĵetitan tra la mondo, do ne eblas atendi, ke ĝiaj membroj loĝu (aŭ eĉ pasigu multe da tempo) en proksima kunesto unu kun la alia. Demografiaj trajtoj eble ne kongruas kun tiuj de la pli larĝa socio (aŭ de la lokaj komunumoj) en kiuj esperantistoj troviĝas, kvankam estas malfacile precize konstati tion. Laŭ antaŭaj studoj pri Esperanto, oni povus atendi pli da viroj, pli da aĝaj personoj, kaj pli da homoj en liberalaj intelektaj profesioj ol en la ĝenerala loĝantaro. Kiel ĉiam, oni devus uzi analizajn alirojn al genro, kiuj inkluzivas kvirajn vivspertojn, precipe konsiderante la nehegemonian karakteron de membreco en la Esperanta komunumo. Anoj estas ligitaj per ideologioj asociitaj kun la movado (ekzemple la valoroj de homaranismo), kvankam la grado de identigo kun tiuj valoroj varias. Eble plej prudente estas rigardi esperantistojn kiel anojn de komunumo de praktiko (aŭ eĉ diskurs-komunumo, laŭ Gledhill 2000) inter multlingvuloj, kiuj kunvenas por uzi Esperanton, plejparte ekskluzive de aliaj lingvoj en siaj repertuaroj.

Kiaj praktikaj problemoj aperos dum la studado de variado en Esperanto, specife rilate al fonetika kaj fonologia variado? Studi sonan variadon en Esperanto per intervjuoj (la plej ofta metodo) postulas atenton al la denaskaj lingvoj de la intervjuotoj. Necesas certigi, ke la analizota variado estu racie atendebla ĉe ĉiuj partoprenantoj. Tio ofte implicas konsideron pri geografia variado ene de la denaska lingvo. Ekzemple, se oni volas ekzameni la realigon de r-sonoj en la Esperanto de britanglaj parolantoj (kiel en Hawkey aperos), oni devas memori, ke normaj akĉentoj de la suda brita angla ne prononcas la postvokalan /r/, kiam ĝi aperas antaŭ konsonanto aŭ paŭzo, dum aliaj dialektoj ja faras tion. Tial, ne sufiĉas, ke ĉiu partoprenanto estu denaska parolanto de la brita angla; gravas ankaŭ la specifa regiona dialekto. Kompreneble, tiuj konsideroj validas por ĉiuj specoj de variado (ekz. gramatika aŭ leksika), ne nur sona – la intervjuotoj devas esti zorge elektitaj por certigi, ke la rezultoj estu validaj. Tio eble kondukas al malgrandaj specimenoj, ĉefe se oni same konsideras plian gravan praktikan problemon, nome la geografian disiĝon de la esperantistoj. Studoj pri sona variado kutime postulas ĉeestajn intervjuojn registritajn per altkvalitaj iloj, kio povas esti defia kiam parolantoj ne loĝas proksime unu al la alia. Tiu problemo povas esti parte solvita per kolektado de datumoj dum Esperanto-aranĝoj (lokaj kluboj, landaj kongresoj, ktp).

3 Resumo de segmenta fonologio en Esperanto

En ĉi tiu sekcio, mi skizos la sonsistemon de Esperanto. Kiel ni jam scias, parolantoj de Esperanto kutime ne estas denaskaj – pro tio, la denaska fonologio (aŭ tiu de aliaj lingvoj de la repertuaro de la parolanto) povas influi la prononcon de Esperanto.¹² Ne eblas doni ĉiujn ekzemplojn de fonetika aŭ fonologia kontakto ĉi tie – la celo de la sekcio ne estas priskribi ĉiujn akĉentojn de Esperanto en la mondo! Tamen, mi traktos kelkajn el la plej rimarkindaj trajtoj de lingva variado pro nenorma lingva kontakto kun diversaj denaskaj lingvoj. La celo estas reliefigi tiujn trajtojn, kiuj povus esti esplorataj en estontaj projektoj pri fonetika kaj/aŭ fonologia variado, tiel provizante utilan (kvankam ne kompletan) ilaron por tiuj, kiuj volas okupiĝi pri tia esplorado.

3.1 Vokaloj

3.1.1 Monoftongoj

Esperanto havas simplan, kvinvokalan monoftongan fonemaron:

	Antaŭa	Malantaŭa
Malvasta	/i/ <i>	/u/ <u>
Meza	/e/ <e>	/o/ <o>
Vasta	/a/ <a>	

Tabelo 1: Monoftongaj fonemoj en Esperanto kaj ortografio

Malvastaj vokaloj

Oni kutime produktas la malvastajn vokalojn /i/ kaj /u/ laŭnorme, t.e. laŭ la langopozicio de la bazaj vokaloj (*cardinal vowels*, angle) 1 [i] kaj 8 [u] respektive:

ŝipo /'ŝipo/ > ['ʃi:pø]

ludo /'ludo/ > ['lu:dø]

Kompreneble, la prononco de tiuj vokaloj povas ŝanĝiĝi laŭ la denaska lingvo de la parolanto. Pro influo de la angla kiel denaska lingvo, tiuj vokaloj povas esti preskaŭ malvastaj ([ɪ], [ʊ]), ĉefe en antaŭakcentaj silaboj

¹² Fakte, tio validas ankaŭ por denaskuloj de Esperanto, kies fonologio ofte estas influata de la alia(j) denaska(j) lingvo(j).

(*pre-tonic syllables*, angle), ekz. *diveni* kiel [dɪˈvɛːni] aŭ *kulero* kiel [kʊˈlɛːrɔ]. Same, pro influo de la franca kiel denaska lingvo, la malantaŭa malvasta vokalo /u/ povas esti antaŭigita ĝis [y], eĉ en akcentaj silaboj, ekz. *pura* kiel [ˈpyːʁä]. Tiu [y] prononco estas klare pli nenorma ol la antaŭmenciitaj [ɪ] kaj [ʊ], kaj pro la granda vokala distanco inter [u] kaj [y], kaj pro la fakto, ke ĝi aperas en akcenta silabo (kio povas longigi la vokalon). Eble pro tio, la [y] estas klara trajto de la franca akĉento en Esperanto.

Mezaj vokaloj

Kiel aliaj lingvoj, kiuj havas kvinvokalajn monoftongarojn, la mezaj vokaloj /e/ kaj /o/ multe variadas en Esperanto, kaj alofone kaj sociolingvistike. Laŭnorme, /e/ devus realiĝi ie inter la bazaj vokaloj 2 [e] kaj 3 [ɛ], kaj /o/ estu prononcata ie inter la bazaj vokaloj 6 [ɔ] and 7 [o]. Mi reprezentas tiujn ‘verajn mezajn’ realigojn pere de la simboloj [ɐ] kaj [ɔ̞]:

vere /ˈvere/ > [ˈvɛːrɐ]

koro /ˈkoro/ > [ˈkɔ̞ːrɔ]

Wells (1989, 22) agnoskas, ke “la realigo de la vokaloj povas esti iom elasta [kaj] eĉ relative granda variado je la realigo ne kaŭzas konfuzon”. Wells (1989, 22) kaj Kalocsay kaj Waringhien (1980, 21) proponas alofonajn regulojn, kiuj imitus la francan *loi de position* (pozicia leĝo), laŭ kiu malfermaj vokaloj emas aperi en fermitaj silaboj kaj inverse. Tia sistemo produktus kontrastojn kiel *veni* [ˈveːni] kaj *vendi* [ˈvɛ(:)ndi]. Tamen estas dubinde, ĉu tio vere spegulas la uzon, ĉar la parolkomunumo konsistas ĉefe el nedenaskaj parolantoj kun tre diversaj denaskaj lingvoj. Hawkey (aperos), surbaze de intervjuoj kun denaskaj parolantoj de la brita angla, proponas ke mezaj vokaloj en Esperanto varias laŭ sociolingvistikaj kaj stilaj faktoroj. La datumoj montras ne nur variantojn laŭ vasteco ([ɛ] kaj [ɐ]; [ɔ] kaj [o]), sed ankaŭ diftongigitajn formojn, kie /e/ ofte realiĝas kiel [eɪ] kaj /o/ kiel [əʊ]. Tiu fenomeno jam estis priskribita en la literaturo kiel ofta trajto de la Esperanto de denaskaj parolantoj de la angla (Kalocsay kaj Waringhien 1980, 45; Wells 1989, 26; Wennergren 2023, 12), kaj normigaj manlibroj malrekomendas tiajn prononcojn:

sole /ˈsole/ > [ˈsəʊleɪ]

bovo /ˈbovo/ > [ˈbəʊvəʊ]

Alia konsekvenco de influo el la angla estas la foja, forte hontosignata realigo de la sekvenco /er/ kiel [ɜː], kio donas formojn kiel [ˈlɜːni] anstataŭ [ˈleːrni] por *lerni*.

Vastaj vokaloj

Laŭnorme, la vasta vokalo /a/ prononciĝas kiel la baza vokalo 4 [a], aŭ iom retroigita al [ä]. Denaska lingvo denove povas influi tiu realigon. Exemple, *ankaŭ* povas esti prononcata de denaskaj parolantoj de la hungara kiel [ˈonkaʊ] per retroigita vokalo (Kalocsay and Waringhien 1980, 45), aŭ de denaskaj parolantoj de la franca per plene nazaligita vokalo [ˈɑ̃kaʊ].

Nazalaj vokaloj

En Esperanto, ne ekzistas nazalaj vokalaj fonemoj, sed vokaloj havas nazaligajn alofonojn kiam ili aperas inter nazalaj konsonantoj, aŭ kiam nazala konsonanto tuj sekvas en silaba kodao:

kato /ˈkato/ > [ˈkɑːtɔ] (sen nazaligo)

mano /ˈmano/ > [ˈmãɲɔ] (nazaligo inter nazalaj konsonantoj)

tempo /ˈtempo/ > [ˈtẽmpɔ] (nazaligo antaŭ nazala konsonanto en silaba kodao)

Longeco de vokaloj

La longeco de vokaloj ne estas fonema distingo en Esperanto (sed mi pritraktos tion plie en la sekcio 3.1.3 pri vokala hiato). Tamen, Kalocsay kaj Waringhien (1980, 40-42) rimarkigas, ke akcentaj silaboj en Esperanto ofte estas longigitaj:¹³

kara /ˈkara/ > [ˈkɑːrɑ]

vere /ˈvere/ > [ˈvɛːrɛ]

En kazoj, kie la unua elemento de kunmetita substantivo perdas sian akcenton pro tio, ke ĝi ne plu troviĝas en la antaŭlasta silabo, la vokalo kutime ricevas kompensan longigon (Kalocsay kaj Waringhien 1980, 42):

koro /ˈkoro/ > [ˈkɔːrɔ]

bato /ˈbato/ > [ˈbɑːtɔ]

korbato /korˈbato/ > [kɔːrˈbɑːtɔ]

Oni notu, ke ĉi tiu kompensa longigo limiĝas al kunmetitaj vortoj kaj ne aperas konsekvence kiam radikoj perdas sian originan akcenton pro la aldono de derivaĵaj afiksoj:

kara /ˈkara/ > [ˈkɑːrɑ]

karulo /ˈkarulo/ > [kɑːruːlɔ]

13 Kalocsay and Waringhien (1980) proponas plurajn kompleksajn regulojn pri prononco. Tamen, ne klaras ĉu tio temas pri rekomendoj por laŭnorma lingvouzo, aŭ observoj pri kiel homoj jam parolas en la reala vivo.

Redukto de vokaloj

Laŭnorme, la monoftongoj de Esperanto ne spertas reduktion en neakcentaj silaboj. Tamen, parolantoj de diversaj lingvoj (la angla, la portugala, la rusa, k.s.) ofte reduktas neakcentajn vokalojn. Tiu fenomeno povas kaŭzi gravan konfuzon, ĉar neakcentaj (ofte postakcentaj) vokaloj enhavas esencajn gramatikajn informojn. Ekzemple, se denaska anglalingvano prononcas [mi pə.'ro.ləs] sub influo de sia gepatra lingvo, povas esti malfacile deĉifri la signifon – ĉu la parolanto celas diri *mi parolas*, *mi parolos* aŭ eĉ *mi parolus*? Pro la risko de tia miskompreno, vokala redukto estas strikte nenorma kaj ĝia uzo estas forte malrekomendata (Wells 1989, 23).

3.1.2 Diftongoj

Esperanto havas ses diftongojn,¹⁴ ĉiuj konsistantaj el plena vokalo sekvata de duonvokalo:

Antaŭa duonvokalo	Malantaŭa duonvokalo
/ui/ <uj>	
/oi/ <oj>	
/ei/ <ej>	/eu/ <eŭ>
/ai/ <aj>	/au/ <aŭ>

Tabelo 2. Diftongoj en Esperanto kaj ortografio

Fakuloj malkonsentas inter si pri tio, ĉu tiuj sonoj vere estas diftongoj aŭ ĉu ili pli ĝuste estu plena vokalo sekvata de duonkonsonanto – ekzemple, /aj/ anstataŭ /aĵ/ (Wells 1989, 19; Wennergren 2023, 13). Tamen, oni ĝenerale konsentas, ke malfalantaj diftongoj pli taŭge analizendas kiel simplaj monoftongaj kun duonkonsonanta /j/ ĉe la komenco – tiel

jaro estas /'jaro/ anstataŭ /'ja:ro/.

Ne estas multe da variado inter fluaj parolantoj pri la realigo de la ses diftongoj en Tabelo 2, kvankam /ui/ kaj /eu/ povas esti malfacile lerneblaj por pluraj lernantoj, sendepende de ties denaska lingvo. La afero komplikiĝas pro tio, ke /ui/ aperas kiel parto de la sekvenco /iui/ en pluraj bazaj korelativoj,

¹⁴ Sepa diftongo /ou/ <ou> troviĝis en iuj vortoj en pli frua Esperanto, sed tiuj vortoj estis anstataŭigitaj per aliaj vortoj, e.g. anstataŭ *poŭpo* oni nun diras *pobo*; same pri *toŭfu* kaj *tofu*.

kiujn oni devas regi jam en la fruaj fazoj de lernado de Esperanto – *kiuj*, *tiuj*, *ĉiuj*, *neniuj* kaj *iuj*. Tiu sekvenco (kaj ĝenerale la diftongo /uj/) estas relative malofta en Esperanto, krom en *tiuj*, tre oftaj vortoj. Lernantoj ofte diras ['ki:wi] anstataŭ la celata ['ki:ui]. La diftongo /eu/ ankaŭ estas sufiĉe malofta, sed aperas en vortkomenca pozicio en la ofta vorto *Eŭropo* kaj ĝiaj derivaĵoj. La denaska lingvo de la parolanto povas influi la prononcon de tiu sono, ekzemple anglalingvanoj dirus [ju' rɔ:pɔ] kaj francalingvanoj [ø' rɔ:pɔ], anstataŭ la norma [eu' rɔ:pɔ].

3.1.3 Vokala hiato

En Esperanto, du vokaloj ofte kuniĝas en situacio de hiato. Tiel, ĉiu vokalo estas la nukleo de ĝia propra silabo:

ĥaoso [xä.'ɔ:.sɔ] (tri silaboj)

ideo [i.'dɛ:.ɔ] (tri silaboj)

kiam ['ki:.ãm] (du silaboj)

boato [bɔ.'ä:.tɔ] (tri silaboj)

dua ['du:.ä] (du silaboj)

Ofte, la du vokaloj en hiato estas malsamaj (kiel ĉi-supre), sed ne ĉiam:

balaas [bä.'lä:.äs] (tri silaboj)

ree ['rɛ:.ɛ] (du silaboj)

scii ['stsi:.i] (du silaboj)

zoo ['zɔ:.ɔ] (du silaboj)

neduuma [nɛ.du.'u:.mä] (kvar silaboj)

Kiam temas pri du samaj vokaloj, hiato povas krei minimumajn parojn, kvankam tio estas malofta. *Zo* /'zo/ kaj *zoo* /'zo.o/ formas minimuman paron distingitan nur per vokala hiato. Aliaj paroj estas minimumaj je la segmenta (sed ne suprasegmenta) nivelo, ĉar la aldono de plia silabo kreas distingon de akcento, pro la rigida antaŭlasta akcento en Esperanto:

metro /'me.tro/ kaj *metroo* /me.'tro.o/

pravo /'pra.vo/ kaj *praavo* /pra.'a.vo/

malebla /ma.'le.bla/ kaj *maleebila* /ma.le.'e.bla/

Parolantoj ofte trovas nenormajn solvojn por trakti hiaton, sub influo de siaj diversaj denaskaj lingvoj. Se temas pri malsamaj vokaloj, tio povas inkluzivi duonvokalojn¹⁵ (ekz. [ˈkiːj.ām] anstataŭ [ˈkiːām] por *kiam*; [bɔˈwäː.tɔ] anstataŭ [bɔˈäː.tɔ] por *boato*) aŭ glotalajn plozivojn (e.g. [iˈdɛ.ʔ] anstataŭ [iˈdɛː.ɔ] por *ideo*; [xäˈʔɔː.sɔ] anstataŭ [xäˈɔː.sɔ] por *ĥaoso*). Se temas pri du samaj vokaloj, oni ofte uzas glotalajn plozivojn (ekz. [bäˈlä.ʔäs] anstataŭ [bäˈläːäs] por *balaas*; [nɛ̃.duˈʔuː.mä] anstataŭ [nɛ̃.duˈuː.mä] por *neduuma*) aŭ simpligas la hiaton al unu monoftongo, kun kompensa longigo (ekz. [ˈstsiː] anstataŭ [ˈstsiːi] por *sciĉi*) aŭ sen ĝi ([ˈzɔ] anstataŭ [ˈzɔː.ɔ] por *zoo*). Alia ofta solvo por mezaj vokaloj en hiato estas realigi malvast-mezan vokalon sekvatan de vast-mezan vokalo, kio donas [ˈreː.ɛ] anstataŭ [ˈrɛː.ɛ] (*ree*), kaj [ˈzoː.ɔ] anstataŭ [ˈzɔː.ɔ] (*zoo*).

3.2 Konsonantoj

Esperanto havas 22 konsonantajn fonemojn, jene:

	Labialoj ¹⁶		Dentaloj / Alveolaroj		Post-alveolaroj		Velaroj		Glotalo	
Plozivoj	/p/ <p>	/b/ 	/t/ <t>	/d/ <d>			/k/ <k>	/g/ <g>		
Afrikatoj			/tʃ/ <c>		/tʃ/ <ĉ>	/dʒ/ <ĝ>				
Frikativoj	/f/ <f>	/v/ <v>	/s/ <s>	/z/ <z>	/ʃ/ <ŝ>	/ʒ/ <ĵ>	/x/ <ĥ>		/h/ <h>	
Nazaloj	/m/ <m>		/n/ <n>							
Frapeto/Trilo			/r/ <r>							
Alproksimantoj			/l/ <l>		/j/ <j>					

Tabelo 3. Konsonantaj fonemoj en Esperanto kaj ortografio

Konsonantoj en Esperanto ĝenerale ne estas duobligataj, kvankam tio povas okazi, ĉefe pro procezoj de deriva morfologio, kiel afiksado aŭ kunmetado, kiuj rezultigas du samajn konsonantojn ĉe morfema limo:

15 Van Oostendorp (1999, 59–60) prezentas fonologian pravigon por epentezaj duonvokaloj en ĉi tiuj kunteksto. Laŭ li, la ĉeesto de la duonvokalo/duonkonsonanto evitas la maldezirindan situacion, ke la dua silabo ne eku per konsonanto.

16 Mi uzas la terminojn, kiuj troviĝas en Wells (1989), sed aliaj vortoj eblas. Ekzemple, Wennergren (2024) priskribas la manieron de konsonantoj jene: eksplode (per plozivo), ekfrote (per afrikato), frote (per frikativo) kaj treme (per trilo).

mallaŭta [mäl.'läu.tä]

dissendi [dis.'sĕn.di]

ekkrii [ĕk.'kri:.i]

Tiu distingo de longeco malofte kreas minimumajn parojn, sed kelkaj ekzemploj troveblas (aŭ eblas krei ilin per la tre kreema deriva morfologio de Esperanto):

fina / 'fi.na/ kaj *finna* / 'fin.na /

elitiĝi / ,e.li.'ti.ĉzi/ kaj *ellitiĝi* / ,el.li.'ti.ĉzi/

3.2.1 Plozivoj

Esperanto havas ses plozivajn fonemojn – du labialojn /p/ and /b/, du dentalojn /t/ kaj /d/ du velarojn /k/ and /g/. Tiuj samlokaj konsonantaj paroj povas sperti anticipan voĉadan similigon antaŭ sekva konsonanto (Wennergren 2024, 27), jene:

sepdek / 'sepdek/ > ['sĕ:bdĕk]

absoluta / ,abso'luta/ > [,äpsö'lu:tä]

ladskatolo / ,ladska'tolo/ > [,lätskä'to:lə]

ekzameno / ,ekza'meno/ > [,ĕgzä'mĕ:nə]

Normigaj rekomendoj pri la prononco de /t/ kaj /d/ estas iom neprecizaj. Kalocsay kaj Waringhien (1980, 47), Wells (1989, 18) kaj Wennergren (2024, 26) ĉiuj priskribas tiujn sonojn kiel dentalajn, sed Wennergren konsilas, ke tio eblas per metado de “la lango kontraŭ la karno tuj malantaŭ la supraj dentoj” (Wennergren 2024, 25), kio fakte indikas alveolaran realigon. En praktiko, ĉu /t/ kaj /d/ realiĝas kiel dentalaj aŭ alveolaraj plejparte dependas de la denaska lingvo de la parolanto. Ekzemple, anglalingvanoj emas produkti alveolarajn plozivojn, dum hispanlingvanoj preferas dentalajn. Aliaj influoj de la denaska lingvo povas inkluzivi la palataligon de velaraj plozivoj antaŭ antaŭaj vokaloj ĉe anglalingvanoj, kiel en ['kji:ām] anstataŭ ['ki:ām] (*kiam*), aŭ la neŭtraligon de la distingo inter /b/ kaj /v/ ĉe hispanlingvanoj (Wells 1989, 26).

3.2.2 Frikativoj kaj afrikatoj

Kalocsay kaj Waringhien (1980, 41) proponas /ĉz/ kiel la voĉan alveolaran afrikatan fonemon, kiu estus la voĉa ekvivalento de /ts/, kaj tiel *edzo* /'edzo/ kaj *eco* /'etso/ estus minimuma paro. Tamen, Wells (1989, 18), van Oostendorp (1999, 68), Fiedler kaj Brosch (2022, 60) kaj Wennergren (2024, 28) ne konsentas, kaj opinias, ke temas pri du apartaj fonemoj /d/

kaj /z/ prononcataj sinsekve. Fakte, tio apenaŭ havas praktikan signifon, krom ke la silabigo de *edzo* estus /'ed.zo/ anstataŭ /'e.dzo/. Aldone, povas krei afrikatan alofonon [ts] de la alveolara frikativa fonemo /s/ kiam ĝi sekvas nazalan konsonanton:

enspezo /en'spezo/ > [ĕnts'pɛːzɔ]

ansero /an'sero/ > [ǎn'tsɛːrɔ]

3.2.3 Nazaloj

Esperanto havas nur du nazalajn konsonantajn fonemojn /m/ kaj /n/, kvankam similiĝo povas doni realigojn de [ŋ] antaŭ velaroj kaj [ɲ] aŭ [n̪] antaŭ palata duonkonsonanto [j] aŭ malvasta antaŭa vokalo [i]:

ankaŭ /'ankaŭ/ > [ˈǎːŋkaŭ]

Anglujo /an'glujo/ > [ǎŋ'gluːjɔ]

panjo /'panjo/ > [ˈpǎːɲɔ]

nia /'nia/ > [niːǎ]

Oni jam pritraktis similiĝon al la velara nazalo [ŋ] en verkoj pri la prononco de Esperanto (Kalocsay kaj Waringhien 1980, 47; Wells 1989, 17, 24; Wennergren 2024, 27). Ĉiuj ĉi manlibroj priskribas la velaran realigon kiel norme akcepteblan antaŭ velara konsonanto, ĉar en Esperanto ne ekzistas la fonemo /ŋ/ – tial, tia realigo ne neŭtraligus foneman distingon. Oni povus diri la samon pri la palatalaj prononcoj [ɲ] kaj [n̪] antaŭ palatala konsonanto aŭ malvasta vokalo, sed la normaj rekomendoj ne konsentas prie. Wells (1989, 24) kaj MacGill (2020, 30) malrekomendas tiajn prononcojn, ĉefe antaŭ /i/.

3.2.4 R-ecaj konsonantoj kaj alproksimantoj

Mi prezentas la r-ecan fonemon kiel apikan frapeton /r/ (kaj ne kiel apikan trilon /r̥/), ĉar Hawkey (aperonta) montras, ke la frapeta varianto estas multe pli ofta ol la trila, kaj tial ĝi pli fidele reprezentas la fonemon. En la originala eldono de la *Fundamento*, Zamenhof inkludis indikan gvidilon pri prononco en la gramatika sekcio, tradukitan en la anglan, francan, germanan, rusan kaj polan lingvojn (Zamenhof 1905). En ĉiu el tiuj tradukoj, la grafemo <r> estis egaligita al la r-ecaj fonemoj de la koncernaj lingvoj, kio implicas, ke almenaŭ [r], [r̥], [ɹ], [ʁ] kaj [ʀ] estus norme akcepteblaj realigoj de /r/. Dum la tempo pasis, apikaj realigoj [r̥] kaj [r̥] fariĝis preferataj laŭ prononconormoj. Wells (1989, 26) rimarkas, ke /r/ “prononcata per vibro de la langopinto estas pli ŝatata ol diversaj aliaj specoj”. Pli freŝdate, Wennergren (2023, 14) priskribas la realigon de /r/ kiel “normale denta, sed fakte ne gravas, kie en

la buŝo oni faras la sonon. Ekz. uvula (kartava) R estas tute bona alternativo. La grava afero pri R estas, ke ĝi estu vibranto". La kialo donita (laŭ Wells 1989 kaj Wennergren 2023) estas la bezono eviti konfuzon kun /l/, precipe por parolantoj de lingvoj kie la likvidoj /r/ kaj /l/ estas en komplementa, ne kontrasta, distribuo. MacGill (2020, 30) rimarkigas, ke la neŭtraligo de la likvida distingo estas trajto de denaskaj parolantoj de orient-aziaj lingvoj, ekz. la ĉina kaj la japana. Alia nenorma (kaj forte hontosignata) fenomeno estas la forigo de r-ecaj sonoj inter antaŭa vokalo kaj posta konsonanto, ĉefe de denaskaj parolantoj de la angla (Wennergren 2024, 28; Hawkey aperos). Tiel, *karto* /'karto/ realiĝus kiel ['kɑ:tə] (aŭ pli verŝajne ['khä:təu]), kio igus la vorton homofona kun *kato*.

Kiel menciite en la sekcio 3.1.2, la grafemo <j> reprezentas kaj la duonvokalon /j/ (kiu aperas kiel la dua elemento de falanta diftongo) kaj la duonkonsonanton /j/.

4 Konklude

Mi esperas, ke mi montris, kial la studado de fonetika kaj fonologia variado gravas por kompreni la uzon kaj evoluon de lingvo. Mi same esperas, ke mi reliefigis la disecon de la esperantistaro, kaj kial variadismaj studoj pri la internacia lingvo devas alpreni malsaman aliron ol tiuj pri pli grandaj lingvoj, aŭ pri malpli disaj komunumoj. Mi prezentis superrigardon pri segmenta fonologio, kiu povas esti utila ilaro por estontaj fakuloj, kiuj volas ekzameni sonan variadon en Esperanto. Tamen, ĉi tiu artikolo celas esti nur deirpunkto por estontaj esploroj, kaj kompreneble mi ne ĉion pritraktis. Miaj ekzemploj venas ĉefe el la plej konataj fenomenoj de lingva kontakto en Esperantujo – ekzemple, la Esperanto de anglalingvanoj, de francalingvanoj, aŭ de ĉinlingvanoj. Tamen, mi traktis nek suprasegmentajn trajtojn, nek 'pli novajn' grupojn de parolantoj. Kombinante ĉi tiujn du aferojn, ĉu eblas, ke brazilaj parolantoj evoluigas novan esperantan akĉenton, pro influo de la prozodio de la brazila portugala, ekzemple? Nur eventualaj estontaj studoj pri sona variado en Esperanto povos respondi al tiaj demandoj. Plej grave, mi esperas, ke ĉi tiu artikolo inŝpiros esploristojn pri esperanta lingvistiko uzi la ĉefajn principojn de variadismo por pli profunde kompreni nian lingvon kaj la diversajn, mirindajn homojn, kiuj ĝin parolas.

Dankoj

Dankon al ESF pro la subvencio pere de la *Programo por Interlingvistika Subteno*. Dankon al Rico Giacometto kaj Edmund Grimley-Evans pro ilia intereso pri la fonetiko de nia lingvo.

Bibliografio

- “Arpitana lingvo.” 2024. *Vikipedio*. https://eo.wikipedia.org/wiki/Arpitana_lingvo
- Becker, Ulrich. 2006. “Publishing for a diaspora: The development of publishing in the international Esperanto movement.” *Language Problems and Language Planning* 30: 269–301. <https://doi.org/10.1075/lplp.30.3.06bec>
- Caligaris, Irene. 2016. *Unu lingvo por ĉiuj, unu lingvo de neniu lando: Surkampa esplorado pri la esperantaj identecoj*. Pisa: Edistudio.
- Chomsky, Noam. 1957. *Syntactic Structures*. 's-Gravenhage: Mouton.
- Eckert, Penelope kaj Sally McConnell-Ginet. 1992. “Think practically and look locally: Language and gender as community-based practice.” *Annual Review of Anthropology* 21, 461–490. <https://doi.org/10.1146/annurev.an.21.100192.002333>
- Fiedler, Sabine kaj Cyril Robert Brosch. 2022. *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*. Amsterdam/Philadelphia: John Benjamins. <https://doi.org/10.1075/wlp.10>
- Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and its Rivals: The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press. <https://doi.org/10.9783/9780812291278>
- Gledhill, Christopher. 2000. *The Grammar of Esperanto: A Corpus-based Description*. Munkeno: Lincom Europa.
- Gledhill, Christopher. 2014. “Phraseology as a measure of emergent norm: The case of Esperanto.” En *Politiques linguistiques et autochtones d'enseignement dans l'Europe des vingt-sept*, redaktis José-Carlos Herreras, 317–348. Valenciennes: Presses Universitaires de Valenciennes.
- Gobbo, Federico. 2017. “Beyond the nation-state? The ideology of the Esperanto movement between neutralism and multilingualism.” *Social Inclusion* 5, kajero 4, 38–47. <https://doi.org/10.17645/si.v5i4.1140>
- Gobbo, Federico. 2021. “Coolification and language vitality.” *Languages* 6: 93
- Guy, Gregory R. 2011. “Variation and change.” En *Analyzing Variation in English*, redaktis Warren Maguire kaj April McMahon, 178–198. Cambridge: Cambridge University Press. <https://doi.org/10.1017/CBO9780511976360.009>
- Hampton, Jessica. 2023. *Kiel povas Esperanto helpi aliajn minoritatajn lingvojn? Stam mo a vèder! How can Esperanto help other minority languages? Let's find out! A sociolinguistic enquiry into the linguistic practices of Esperanto and Emilian speakers*. Tezo de doktoriĝo: University of Liverpool.
- Hawkey, James. *Aperos. Language Variation in a Fragmented Community: Style and Ideology among Speakers of Esperanto in the United Kingdom*. Abingdon: Routledge.

- Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1980. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 4-a, tralaborita, eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Karlander, David. 2024. "Up from Babel: On the (r)evolutionary linguistic thought of Eugène Lanti." *Language and Communication* 96: 13–25. <https://doi.org/10.1016/j.langcom.2024.02.003>
- Kasstan, Jonathan R. 2019. "Emergent sociolinguistic variation in severe language endangerment." *Language in Society* 48: 685–720. <https://doi.org/10.1017/S0047404519000472>
- Kimura, Goro Christoph. 2012. "Esperanto and minority languages: A sociolinguistic comparison." *Language Problems and Language Planning* 36: 167–181. <https://doi.org/10.1075/lplp.36.2.05kim>
- Labov, William. 1966. *The social stratification of English in New York City*. 2-a eld. 2006. Cambridge: Cambridge University Press. <https://doi.org/10.1017/CBO9780511618208>
- Labov, William. 1972. *Sociolinguistic Patterns*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Labov, William. 1994. *Principles of Linguistic Change*. Vol. 1: *Internal Factors*. Oxford: Blackwell.
- Lindstedt, Jouko. 2010. "Lingvo – rimedo aŭ resurso?" En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 51–62. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- MacGill, Stefan. 2020. "Esperanta didaktiko." En *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, 4-a eld., redaktis Katalin Kováts, 21–36. Rotterdam: ILEI / The Hague: Edukado.net / Partizánske: E@I.
- Mooney, Damien. 2024. *Language and dialect death: Theorising sound change in obsolescent Gascon*. Cham: Palgrave Macmillan. <https://doi.org/10.1007/978-3-031-51101-1>
- Nance, Claire. 2015. "'New' Scottish Gaelic speakers in Glasgow: A phonetic study of language revitalisation." *Language in Society* 44: 553–579. <https://doi.org/10.1017/S0047404515000408>
- Nance, Claire. 2022. "Sound change or community change? The speech community in sound change studies: a case study of Scottish Gaelic." *Linguistics Vanguard* 8: 677–689. <https://doi.org/10.1515/lingvan-2021-0023>
- Nance, Claire, Wilson McLeod, Bernadette O'Rourke kaj Stuart Dunmore. 2016. "Identity, accent, aim and motivation in second language users: New Scottish Gaelic speakers' use of phonetic variation." *Journal of Sociolinguistics* 20: 164–191. <https://doi.org/10.1111/josl.12173>
- O'Keeffe, Brigid. 2021. *Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia*. London: Bloomsbury.

- O'Rourke, Bernadette, Joan Pujolar kaj Fernando Ramallo. 2015. "New speakers of minority languages: The challenging opportunity." *International Journal of the Sociology of Language* kajero 231: 1–20. <https://doi.org/10.1515/ijsl-2014-0029>
- Oostendorp, Marc van. 1999. "Syllable structure in Esperanto as an instantiation of universal phonology." *Esperantologio / Esperanto Studies* 1: 52–80. <https://doi.org/10.59718/ees49153>
- Pietikäinen, Sari, Helen Kelly-Holmes, Alexandra Jaffe kaj Nikolas Coupland. 2016. *Sociolinguistics from the periphery: Small languages in new circumstances*. Cambridge: Cambridge University Press. <https://doi.org/10.1017/CBO9781316403617>
- Piron, Claude. 1989. "Who are the speakers of Esperanto?" En *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages*, redaktis Klaus Schubert kaj Dan Maxwell, 157–171. Berlin: De Gruyter Mouton. <https://doi.org/10.1515/9783110886115.157>
- Pujolar, Joan. 2022. "New speakers: new linguistic subjects." En *The Changing Face of the "Native Speaker"*, redaktis Nikolay Slavkov, Sílvia Melo-Pfeifer kaj Nadja Kerschhofer-Puhalo, 71–100. Boston/Berlin: De Gruyter Mouton. <https://doi.org/10.1515/9781501512353-004>
- Stria, Ida. 2016. *Inventing Languages, Inventing Worlds: Towards a Linguistic Worldview for Artificial Languages*. Doktora disertacio. Poznań: Adam Mickiewicz University.
- Stria, Ida. 2018. "Linguistic worldview in multilingual groups as an indicator of developing a communal identity: The case of Esperanto." *Etnolingwistyka* 30: 215–229. <https://doi.org/10.17951/et.2018.30.215>
- Swales, John. 1990. *Genre Analysis*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Vertovec, Steven. 2004. "Migrant transnationalism and modes of transformation." *International Migration Review* 38: 970–1001. <https://doi.org/10.1111/j.1747-7379.2004.tb00226.x>
- Weinreich, Uriel, William Labov kaj Marvin Herzog. 1968. "Empirical foundations for a theory of language change." En *Directions for Historical Linguistics*, redaktis W.P. Lehmann kaj Yakov Malkiel, 97–195. Austin: University of Texas Press.
- Wells, John. 1989. *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. 2-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertilo. 2023. *Detala Gramatiko de Esperanto* 3-a eld. Partizánske: Espero.
- Wennergren, Bertilo. 2024. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Versio 15.5. Reta publikigo: <https://bertilow.com/pmeg>

- Wood, Richard E. 1979. "A voluntary, non-ethnic, non-territorial speech community." En *Sociolinguistic Studies in Language Contact: Method and Cases*, redaktis William F. Mackey kaj Jacob Ornstein, 433–450. The Hague: Mouton. <https://doi.org/10.1515/9783110810752.433>
- Zamenhof, Ludoviko Lazaro. 1905. *Fundamento de Esperanto. Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro*. Paris: Hachette – <https://data.onb.ac.at/rep/10033690>

Pri la aŭtoro

James Hawkey (naskiĝis en Kimrio en 1984, esperantistiĝis en 2021) estas Profesoro (Reader) pri Lingvistiko kaj Katalunaj Studoj ĉe la Universitato de Bristol, Britio (2014 ĝis nun). Li estas sociolingvisto, kiu specialiĝas pri multlingveco, variadisma sociolingvistiko, lingvaj sintenoj kaj lingvo-politiko, kaj ĉefe fokusiĝas pri katalunlingvaj komunumoj.

Retadreso: james.hawkey@bristol.ac.uk

About the author

James Hawkey (born in Wales in 1984, started learning Esperanto in 2021) is Associate Professor (Reader) in Linguistics and Catalan Studies at the University of Bristol, UK (2014–present). He is a sociolinguist who specialises in multilingualism, language variation and change, language attitudes and language policy, with a main focus on Catalan-speaking communities.

Sobre l'autor

James Hawkey (nascut a Gal·les el 1984, va començar a aprendre l'esperanto el 2021) és Professor Titular de Lingüística i Estudis Catalans a la Universitat de Bristol, Regne Unit (2014–present). És sociolingüista especialitzat en multilingüisme, variació i canvi lingüístic, actituds lingüístiques i polítiques lingüístiques, amb un enfocament principal en les comunitats catalanoparlants.

On the study of phonetic and phonological variation among 'fragmented' Esperanto speakers

Abstract: Esperanto speakers are scattered across the world, and are often not in frequent contact with one another. Furthermore, Esperanto is chiefly spoken as a non-native variety by people with a broad range of different L1 backgrounds. These two factors are important to consider if we wish to better understand how Esperanto is spoken in the twenty-first century. Adopting a variationist approach to the sociolinguistics of

Esperanto offers valuable insights into the language and its speakers. In this article, I advance the concept of ‘fragmented community’ as a means of describing the ways in which the collective of Esperanto speakers differs from other speech communities in terms of its geography, demography, ideology and practice. I then go on to highlight some practical issues that arise from this fragmentation, and offer some potential solutions. Then, in order to encourage further research into phonetic and phonological variation in Esperanto, I provide a general overview of segmental phonology of the language. This should serve as a valuable toolkit for prospective scholars of language variation in Esperanto, as it highlights where and when intra-speaker variation is to be expected. The ultimate goal of the article is to provide the theoretical and practical tools for further studies of the Esperanto sound system in its social context.

Keywords: Variationist sociolinguistics; phonetics and phonology; fragmented community.

Sobre l'estudi de la variació fonètica i fonològica entre parlants d'esperanto en una “comunitat fragmentada”

Resum: Els parlants d'esperanto es troben escampats arreu del món i sovint no mantenen un contacte freqüent entre ells. A més, l'esperanto es parla principalment com a llengüa segona (o adicional) per persones amb una gran diversitat de llengües maternes. Aquests dos factors són importants si volem comprendre millor com es parla la llengua al segle XXI. Adoptar una aproximació variacionista a la sociolingüística de l'esperanto pot aportar una visió valuosa sobre la llengua i els seus parlants. En aquest article, proposo el concepte de «comunitat fragmentada» per descriure les maneres en què el col·lectiu esperantista difereix d'altres comunitats lingüístiques pel que fa a la geografia, la demografia, la ideologia i la pràctica. Tot seguit, poso de relleu alguns problemes pràctics que deriven d'aquesta fragmentació i ofereixo possibles solucions. Finalment, per fomentar una recerca més àmplia sobre la variació fonètica i fonològica en esperanto, presento un resum general de la fonologia segmental de la llengua. Aquesta descripció hauria de servir com a eina útil per als futurs investigadors de la variació lingüística en esperanto, ja que indica on i quan es pot esperar la variació intraparlant. L'objectiu principal de l'article és proporcionar les eines teòriques i pràctiques necessàries per a estudis posteriors sobre la fonologia de l'esperanto en el seu context social.

Paraules clau: sociolingüística variacionista; fonètica i fonologia; comunitat fragmentada.